

## Lingva fono kaj uzado de frazstrukturoj en skribita esperanto

Christian U. Krägeloh

**Resumo.** Onia gepatra lingvo influas la konscion kaj uzadon de fraza vortordo ĉe parolantoj de esperanto. La nuna studo esploras ĉu similaj influoj sur diversecon de frazstrukturoj ankaŭ troveblas en skribita esperanto. Por minimumigi iujn influojn rilate al tekstaja tipo, vortordaj analizoj estis faritaj en specimeno de 110 artikoloj el unu internacia esperanta revuo. Inter aŭtoroj de ĝermanida, latinida kaj slava lingvofonoj, la proporcio de ne-SVO-aj frazoj estis plej granda en la lasta grupo, sed diferencoj estis malgrandaj kaj statistike signifika nur komparinte la slavan kaj latinidan. La rezultoj de la nuna studo ĝenerale konfirmas antaŭajn trovojn de daŭraj lingvaj interinfluo en frazarango.

**Abstract.** *Language background and use of sentence structure in written Esperanto*

Awareness and use of word order in Esperanto speakers are affected by the linguistic properties of their native language. The present study investigates whether similar effects on diversity of phrase structures are also detectable in written Esperanto. To minimise any effects pertaining to text type or genre, phrase analyses were conducted in a sample of 110 articles from one international Esperanto magazine. Among authors from language backgrounds belonging to the Germanic, Romance, and Slavic language groups, the proportion of non-SVO phrases was largest in the last group. However, differences were small and statistically significant only for the comparison between Slavic and Romance language groups. The results of the present study generally confirm previous research findings of long-term interactions between languages during choice of sentence structure.

**E**STAS KONCEPTITE ke akirado de lingvo okazas tra formado de interlingvo<sup>1</sup> (Selinker 1972). Ĝi estas lingvistika sistemo kiu emas alproksimiĝi al la ĉela lingvo de nulo ĝis plena rego. La fruaj interlingvoj retenas multajn elementojn de la gepatra lingvo de la lernanto, sed kun daŭra progreso en lingva akirado la interlingvoj de la L2<sup>+</sup>-lernanto pli kaj pli similas al la lernota

---

<sup>1</sup>Angle: *interlanguage*.

lingvo.<sup>2</sup> La fina celo estas atingita kiam oni ne plu povas distingi la lingvan uzadon inter la lernanto kaj L1-gepatralingvano.<sup>3</sup>

Laŭ alternativa vidpunkto, la akiranto de iu negepatra lingvo ne estas L2<sup>+</sup>-lernanto, sed uzanto (Cook 1999). Malsame kiel la L2<sup>+</sup>-lernanto, kiu estas karakterizata sole bazite sur komparo kun L1-parolanto, la L2<sup>+</sup>-uzanto estas rigardata kiel multkapabla<sup>4</sup> parolanto (Cook 1991). Tiu signifas ke oni ne rigardas la L2<sup>+</sup>-uzanton nur kiel gepatralingvanon kun iu manko kies celo estas fariĝi kiel L1-parolanto – celo kiu laŭdifine estas neatingebla. Ĉe parolantoj de multaj lingvoj ofte troveblas ke la uzado de unu lingvo influas la manieron de uzado de la alia. Ĉi tiuj interinfluoj estas dinamikaj kaj ambaŭdirektaj. Oni ne surpriziĝus pri la fakto ke onia L1-fono influas la manieron de onia L2<sup>+</sup>-lingvoakirado, kaj ofte okazas situacioj en kiuj la lingva fono malhelpas dum la lingva akirado. Tamen, lingva fono povas esti ankaŭ avantaĝo, kiu montriĝas ekzemple per la trovo ke L2<sup>+</sup>-legantoj de la angla estas pli kapablaj ol L1-legantoj identigi kiam la litero *e* estas silenta kaj kiam ne (Cook 2004).

La uzado de L2<sup>+</sup>-lingvo povas influi ankaŭ la uzadon de onia L1-lingvo (Cook, Iarossi, Stellakis & Tokumaru 2003; Tsimpli, Sorace, Heycock & Filiaci 2004), kiu certe montras la ambaŭdirektecon de lingvaj interinfluoj. Nomi la L2<sup>+</sup>-uzantojn multkapablaj emfazas la kompleksan kaj dinamikan manieron de interlingva influo, kaj agnoskas la fakton ke ne necese estas nepra celo ke L2<sup>+</sup>-uzado alproksimiĝu al sameco kun la uzado de unulingva L1-parolanto. Eĉ pli grave, ĝi ne sugestas ian juĝon se tiu sameciĝo ne okazas.

La multkapablula vidpunkto de lingvoakirado (Cook 1999) alportas rektajn aplikojn por scienca esploro en interlingvistiko kaj esperantologio. Planitaj lingvoj, ekzemple esperanto, estas specialaj kazoj inter la lingvoj de la mondo. Klara plimulto de la esperantoparolantoj estas L2<sup>+</sup>-uzantoj, kaj neniu el la je 1 000 taksitaj L1-denaskaj esperantoparolantoj estas unulingva (Lindstedt 2006). Kvankam denaskaj esperantoparolantoj sendube posedas statuson de L1-parolantoj, ili estas malabunde disaj tra la mondo, kaj, malsame kiel neplanitaj lingvoj, kiuj estas plejparte geografie difinitaj, ili ne rolas kiel normo aŭ celnivelo por L2<sup>+</sup>-uzantoj. La plimulto de la L2<sup>+</sup>-esperantouzantoj komunikas kun kaj lernas de aliaj L2<sup>+</sup>-uzantoj, kaj la normo de la lingvo estas malstrikte gardita de plejparte aliaj L2<sup>+</sup>-uzantoj, kiuj formas la Akademion de Esperanto (Fiedler 2006). Ĉar esperanto estas fleksebla lingvo, kiu permesas relative larĝan varion da stiloj, ĝi estas taŭga ilo por esplori la influon de lingva fono sur la uzadon de L2<sup>+</sup>-lingvo.

Fiedler (1999) publikigis ege detalajn frazeologiajn analizojn de la varia

<sup>2</sup>Lernanto de negepatra lingvo kutime estas nomata *L2-lernanto* aŭ pli precize *L2<sup>+</sup>-lernanto*, kiam la lernanto jam havas scipovon flue paroli pli ol unu negepatran lingvon.

<sup>3</sup>Vidu Davies (2003) por detala diskuto pri la koncepto *gepatralingvano*.

<sup>4</sup>Angle: *multi-competent*.

uzado de idiomoj kaj esprimoj en esperanto, sed gramatikaj varioj de esperanto ankoraŭ ne ricevis tiom da atento. Rakontoj kaj anekdotoj post internaciaj esperantokongresoj ŝajnas montri ke ja ekzistas klaraj diferencoj en la uzado de esperanta gramatiko inter parolantoj el malsamaj lingvaj fonoj, sed nur malmultaj studoj sisteme esploris tiun temon. Escepto estas studo de Hiroshi Nagata and Renato Corsetti (2005), kiu analizis la uzadon de esperanto inter homoj de diversaj lingvofonoj kaj de diversaj spertniveletoj en ilia uzado de esperanto. En unu tasko partoprenantoj juĝis la akcepteblecon de frazoj je vortordo subjekto-verbo-objekto (SVO) aŭ transformitaj frazoj, ekzemple:

SVO: *La knabo renkontis grandan hundon sur la strato.*

Transformita al OVS: *Grandan hundon renkontis la knabo sur la strato.*

Parolantoj de lingvoj kiuj permesas relative limigitan flekseblecon en frazstrukturoj, ekzemple la angla, ĝenerale juĝis transformitajn frazojn malpli akcepteblaj ol L2<sup>+</sup>-esperantouzantoj de lingva fono kiu permesas pli da fleksebleco, ekzemple la rusa. Tiuj diferencoj estis malpli grandaj inter spertuloj de esperanto. Tiaj emoj de parolantoj preferi frazstrukturojn de siaj gepatraj lingvoj ankaŭ montriĝis kiam la partoprenantoj libere priskribis scenon en bildo.

La intenco de la nuna studo estis pliesplori la influon de lingva fono sur diversecon en uzado de gramatikaj frazstrukturoj ĉe L2<sup>+</sup>-esperantoparolantoj. Pro la fakto ke esperanto permesas larĝan varion en stiloj kaj gramatikaj alternativoj, la influo de lingva fono eble ankaŭ montriĝus en skribitaj materialoj publikigitaj de spertaj kaj kapablaj esperantistoj. Por minimumigi iujn efikojn de stilo aŭ alia intermiksa variabla, ĉi tiu studo analizis tekstaron publikigitan interne de nur unu komunikilo. La internacia dumonata revuo *Kontakto* estas socio-kultura gazeto por junaj kaj komencantaj esperantistoj. Ĝin eldonas kunlabore Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Roterdamo. Tiu revuo estas taŭga por tia esploro ĉar ĉiu aŭtoro indikas landon de sia loĝo aŭ aparteneco. Lingva uzado evoluas kaj ŝanĝiĝas (Herring 2005), kaj, ĉar la celo estis esplori la nuntempan uzadon de esperanto, nur artikoloj post la jaro 1999 estis analizitaj. Surbaze de la trovoj de Nagata & Corsetti (2005) estis antaŭvidite observi sistemajn diferencojn inter la frazuzado de homoj el diversaj lingvaj fonoj.

### Dankesprimoj

Mi volas esprimi mian dankon al miaj samideanoj en la Aŭklanda Esperanto-Societo por helpoplena diskuto pri la temo de la nuna studo. La studo ne eblintus sen la helpo de Howard Gravatt kaj Bradley McDonald kiuj havigis al mi la necesajn numerojn de *Kontakto*. Koran dankon ankaŭ al Brian Fox

kaj Donald Rogers pro detala tralego de preskaŭ fina versio de tiu ĉi artikolo kaj atentigo pri lingvaj korektendaĵoj.

## 1. Metodo

Havebliĝis 34 eldonoj de *Kontakto* post la jaro 1999. Ĉar aŭtoro estis traktata statistike kiel hazarda variablo, nur po unu artikolo por aŭtoro estis hazarde elektita. Kiel menciite supre, nur artikoloj publikigitaj post la jaro 1999 estis inkluditaj. Entute 110 artikoloj estis elektitaj por analizo laŭ la jenaj kriterioj:

- Artikoloj devis enhavi almenaŭ 30 frazokazaĵojn.
- Artikoloj skribitaj de pli ol unu aŭtoro ne estis elektitaj, same kiel artikoloj de aŭtoroj kiuj indikis pli ol unu lando, kaj artikoloj kiuj estis tradukitaj.
- Intervjuoj, poemoj, aŭ artikoloj markitaj facilaj ankaŭ ne enestis la analizon.

Ĉiu specimeno de 30 frazoj ricevis lingvan kodon laŭ indiko donita de la aŭtoro de la artikolo. Por ke la nombro de la specimenoj ne estu tro malgranda, tekstaĵoj estis asignitaj laŭ lingvaj grupoj ne tro strikte difinitaj. Ekzemple, eroj de aŭtoroj el Britio kaj Usono ricevis la kodon por la angla. Kvankam ekzistas nemalgranda lingvaj diferencoj inter la rusa kaj la ukraina, artikoloj de aŭtoroj el Rusio kaj Ukrainio engrupiĝis en la saman kategorion, same kiel artikoloj el Norvegio kaj Svedio aŭ Ĉeĥio kaj Slovakio.

La proporcio de SVO-aj frazoj en specimeno de 30 frazoj de ĉiu artikolo estis kalkulita per divido per 30 de la nombro de okazoj de SVO-aj frazstrukturoj. Inkluditaj estis okazoj kiam subjektoj kaj objektoj estis pronomoj. Analizitaj estis ĉefrazoj kaj ankaŭ subfrazoj. La statistikaj kalkuloj estis faritaj pere de la programo SPSS, versio 14.0 (SPSS Inc. 2005). La dependa variablo estis la proporcio de SVO-aj strukturoj, kaj la sendependa estis la lando indikita de la aŭtoro de ĉiu artikolo. Intergrupaj diferencoj estis testitaj per analizo de varianco (ANOVA) aŭ *t*-testo se estis malpli ol tri grupoj por kompari. Kiel malpli riskema kaj pli konservativa alternativo, ankaŭ neparametraj testoj estis uzataj, ĉar oni suspektus ke la distribuo de proporcioj ne necese estis laŭ la normala distribuo.

## 2. Rezultoj

Entute 110 specimenoj de tekstaĵoj estis identigitaj kaj inkluditaj laŭ la supre menciitaj kriterioj. Tabelo 1 listigas la nombrojn de specimenoj por lando de la aŭtoroj. La plej granda grupo estis el Rusio/Ukrainio, kun 22 kontribuintoj. El angle parolantaj landoj troviĝis 11 aŭtoroj, kaj 10 el hispane parolantaj landoj. La 8 portugale parolantaj kontribuintoj venis sen escepto

el Brazilo. La mezvalora proporcio de la tuta specimeno<sup>5</sup> estis 0,901 kun varianca devio de 0,072. Kompreneble la rezultoj por lingvoj kun malgranda specimeno estas malmulte informdonaj.

Lingvogrupo	<i>N</i>	Proporcio
rusa/ukraina	22	0,897
angla	11	0,942
hispana	10	0,927
portugala	8	0,908
germana	8	0,946
itala	5	0,953
serbo-kroata	5	0,887
franca	4	0,950
norvega/sveda	4	0,917
ĉeĥa/slovaka	2	0,867
ĉina	2	0,909
japana	2	0,933
nederlanda	2	0,750
vjetnama	2	0,950
bulgara	1	0,567
aliaj	22	0,901

Tabelo 1. *Nombroj de specimenoj (N) por lingvo de lando de kontribuinto kaj la mezvalora proporcio de SVO-aj frazoj.*

Surbaze de la rezultoj de Nagata & Corsetti (2005) testo de planita komparo<sup>6</sup> inter la rusa/ukraina kaj la angla estas permesebla. Kontribuintoj el Rusio kaj Ukrainio uzis pli da ne-SVO-aj frazstrukturoj ol kontribuintoj el angle parolantaj landoj, sed la diferenco ne estis statistike signifa (*t*-testo;  $t = -1,828$ ;  $p = 0,077$ ). La sama rezulto estis trovita per neparametra testo (Mann–Whitney;  $U = 74,500$ ;  $p = 0,071$ ). Ĉar ankaŭ estas bone konate ke la germana permesas pli flekseblan uzadon de frazstrukturoj ol la angla, planita testo ankaŭ estis farita por testi diferencon inter la germanaj kaj la anglaj parolantoj. La diferenco tute ne estis signifa laŭ *t*-testo ( $t = 0,152$ ;  $p = 0,881$ ), kaj same ne laŭ Mann–Whitney-testo ( $U = 42,500$ ;  $p = 0,904$ ).

Ĉar ne haveblis sufiĉe granda nombro de specimenoj por pluj komparoj inter individuaj lingvoj, ĉiuj lingvoj estis engrupigitaj laŭ pli ĝeneralaj kategorioj, kiel montrite en Tabelo 2. Aliaj lingvoj ne estis inkluditaj en postaj statistikaj analizoj, ĉar la diverseco inter ili estis tiel granda ke estus sen senco samgrupigi ilin kaj trakti ilin laŭ unu kategorio.

<sup>5</sup>Laŭ PIV 2002 la statistika termino estas *muestro*, distinge disde *samplo*.

<sup>6</sup>Angle: *planned comparison*.

Lingvogrupo	Lingvoj	$N$	Mezvalora proporcio	Varianca devio
ĝermanida	angla germana nederlanda norvega/sveda	25	0,924	0,072
latinida	franca hispana itala portugala	27	0,930	0,046
slava	bulgara ĉeĥa/slovaka rusa/ukraina serbo-kroata	30	0,882	0,088

Tabelo 2. *Lingvokategorioj kaj la individuaj lingvoj kiuj apartenas al ili. Ankaŭ montritaj estas iliaj nombroj de la specimenoj ( $N$ ), mezvaloraj proporcioj kaj variancaj devioj.*


Diagramo 1 montras la mezvalorajn proporciojn kun eraro de taksado<sup>7</sup> por ĉiu el la ĝeneralaj lingvokategorioj. Kiel videblas tie kaj en Tabelo 2 la proporcio de SVO-aj frazstrukturoj estis plej malgranda por slavaj lingvoj. ANOVA trovis ke estis signifa diferenco inter la grupoj ( $df = 2$ ;  $F = 3,780$ ;  $p < 0,050$ ). Tiu rezulto konfirmiĝis per ekvivalenta neparametra testoj (Kruskal-Wallis;  $df = 2$ ;  $\chi^2 = 7,379$ ;  $p < 0,050$ ). Uzo de a-posteriori-Bonferroni-korekto por kaj parametra kaj neparametra testoj montras ke la sola signifa intergrupa diferenco estas inter la slavaj kaj latinidaj lingvoj ( $p < 0,050$ ). Kvankam la mezvalora proporcio de la ĝermanidaj kaj latinidaj lingvoj ege similis, la diferenco inter la slavaj kaj ĝermanidaj ne estis statistike signifa (Bonferroni;  $p = 0,101$ ).

### 3. Diskuto

#### 3.1. La influo de lingva fono sur la uzadon de frazstrukturoj en skribita esperanto

Nagata & Corsetti (2005) komparis esperantan uzadon inter L1-parolantoj de la angla, hungara, persa kaj rusa. Bedaŭrinde la nuna studo ne povis fari la samajn intergrupajn komparojn, ĉar la specimeno ne enhavis sufiĉe da specimenoj el la hungara kaj persa. Komparo de la uzado de frazstrukturoj

<sup>7</sup>Angle: *standard error of estimate*.



Diagramo 1. Mezvaloraj proporcioj de la tri ĝeneralaj lingvakategorioj (ĝermanida, latinida kaj slava). Ankaŭ montritaj estas la valoroj de eraro de taksado. La asterisko markas signifikan intergrupan diferencon.

inter aŭtoroj de angla kaj rusa lingvofonoj montris ke ruslingvanoj uzis ne-SVO-ajn frazojn pli ofte ol aŭtoroj de angle parolantaj landoj, sed ĉi tiu diferenco ne estis statistike signifika. Tio ja kontraŭas la trovon de Nagata & Corsetti (2005), sed oni rajtas spekulativi ĉu signifika diferenco estus trovita en la nuna studo se la specimeno estintus pli granda.

Iomete surpriza estas la trovo ke ne estis diferenco en frazuzado inter aŭtoroj el angle kaj germane parolantaj landoj. La germana permesas pli da varioj en frazaj vortordoj ol la angla, kio estas la kaŭzo ke multaj esploroj pritraktis la interinfluan de la angla kaj germana, specife en fleksebla frazaranĝo<sup>8</sup> (Hopp 2005). Por pligrandigi specimenaron por la statistikaj analizoj, la specimenoj de artikoloj estis engrupigitaj en pli ĝeneralajn kategoriojn. Inter la ĝermanida, latinida kaj slava lingvogrupoj, aŭtoroj de slava lingvofono montris plej maloftan uzadon de la kutima SVO-a frazstrukturo. Nur la diferenco inter la latinidaj kaj slavaj lingvoj estis statistike signifika. Sed, ĉar la mezvaloraj proporcioj de SVO-aj frazoj ege similis inter la latinidaj kaj ĝermanidaj lingvoj, oni rajtus suspekti ke ankaŭ montriĝintus diferenco inter la ĝermanida kaj slava grupoj se la specimeno estintus pli granda.

<sup>8</sup>La angla termino por tiu nocio estas *scrambling* 'malaranĝado'. Ĉar ĝi implicas iom da negativa kromsignifo kaj juĝo, la pli neŭtrala termino *fleksebla frazaranĝo* estas preferebla.

Bedaŭrinde finna-hungara lingvogrupo ne povis esti inkludita pro nesufiĉo de specimenoj.

Sume, 3 300 frazoj el 110 individuaj specimenoj el la revuo *Kontakto* estis analizitaj. En preskaŭ 90 % de la kazoj SVO-aj frazstrukturoj estis uzataj. Tiu rezulto kontraŭas la trovon de Gledhill (2000)<sup>9</sup> kiu raportis ke ofteco de SVO-aj frazoj estis 67.5 % en specimenaro de 1 045 frazokazoj. Tamen, oni devas noti ke Gledhill faris korpusan analizon kiu inkludis tekstaĵojn de tre diversaj fontoj, dum la nuna studo analizis tekstaĵojn nur interne de unu fonto.<sup>10</sup>

### 3.2. Metodaj limigoj kaj eblaj alternativaj interpretoj de la nunaj rezultoj

Sendube ĉeestis kelkaj faktoroj kiuj povas limigi la supre prezentitajn interpretojn de la rezultoj. Unue, kritiko certe estus adekvata rilate al la kriterioj por asigni artikolon al lingva grupo. La lingva fono de verkintoj de artikoloj estis konstatita laŭ la nomo de la lando kiu estis indikita kune kun la nomo de la aŭtoro. Certe ekzistas ebleco ke kelkaj aŭtoroj indikis landon kies nacia lingvo ne estis ilia gepatra lingvo, en kiu okazo tiuj aŭtoroj estis asignitaj al malĝustaj lingvokategorioj. Aldone, la nuna studo supozis ke ĉiuj verkintoj estis L2<sup>+</sup>-uzantoj de esperanto sen rigardi la eblecon ke kelkaj el ili povus esti denaskaj esperantoparolantoj. Ne nur oni povas imagi ke la probableco de tiu okazo ne estis granda, kaj ankaŭ ni scias ke neniu denaska esperantoparolanto posedas esperanton kiel la sola L1-lingvo. Pro tio oni povas supozi kun sufiĉe da memfido ke iu L1-esperanto aŭtoro ankaŭ posedus scipovon de la nacia lingvo de la indikita lando – se ne kiel L1-lingvo, almenaŭ kiel flua L2<sup>+</sup>-lingvo.

Alia problemo en la nuna studo estus ankaŭ ebla influo de iuj aliaj L2<sup>+</sup>-lingvoj kiujn la verkintoj scipovas paroli. Estas bone konate ke esperantistoj estas lingvoŝatemuloj (Fiedler 2006), kaj ne nur la gepatra lingvo sed ankaŭ la uzado de aliaj lernitaj kaj lernataj lingvoj povas influu la uzadon de ilia L2<sup>+</sup>-esperanto. Tiu estus interesa studtemo por estontaj esploroj kun pli granda specimenaro ol la nuna. Eĉ se estintus konate kiujn aliajn L2<sup>+</sup>-lingvojn la verkintoj posedis, ne estis sufiĉe da specimenoj por inkludi aliajn lingvojn kiel pluajn hazardajn variablojn en la statistikaj analizoj. La ĝenerala termino uzata en la nuna studo estas *lingva fono*, ĉar ne estas koneble ĉu ĉiuj el la aŭtoroj de la specimenaĵoj posedas la nacian lingvon de la indikita lando kiel L1-lingvo, aŭ ĉu ili nur posedas fluan L2<sup>+</sup>-scipovon de tiu lingvo.

<sup>9</sup>Recenzita de Liu (2000).

<sup>10</sup>*Noto aldonita dum la korekto de la presprovaĵoj.* Wim Jansen faris similan sed pli ampleksan studon, kiun li prezentis en sia doktora disertaĵo. Tie la proporcio de SVO-frazoj estas 90,1 % kiam la objekto ne estis esprimita per pronomo (2007:210), sed malpli alta, nur 55,1 %, kiam la objekto estas esprimita per pronomo (2007:214).



Oni certe povas supozi ke la redaktoroj de la revuo *Kontakto* ankaŭ havis influon sur la stilon de la tie publikigitaj tekstoj. Oni nur povas spekulativi pri iuj intencoj fari tion: eble redaktoro volis plifaciligi artikolojn kaj ŝanĝis ne-SVO-ajn frazojn al SVO-aj. Ĉu tio povus klarigi kial la tekstaro enhavis pli malgrandan proporcion de ne-SVO-aj frazoj ol trovis Gledhill (2000)? Alia ebleco estas ke redaktoro influis artikolajn stilojn laŭ sia lingva fono – kaj tiam oni povas supozi ke slavaj stiloj malplislaviĝis aŭ neslavaj plislaviĝis. Sed, kiel ajn, oni ankoraŭ povas trovi diferencojn. Kvankam la rezultoj de tiu ĉi studo ne povas indiki precize kial la diferencoj ekzistas, ili tamen montras notindan fenomenon.

Restas eĉ plua alternativa interpreto de la nunaj rezultoj. Malgraŭ la fakto ke oni povas supozi ke ĉiuj aŭtoroj de la specimenaj artikoloj estas fluaĵ kaj spertaj uzantoj de esperanto, ankoraŭ povus ekzisti sufiĉe da diferencoj en la niveloj de la verkintoj. Ĉu eble la kontribuintoj el orienta Eŭropo estis pli spertaj ol kontribuintoj de aliaj lingvofonoj? Kiel Nagata & Corsetti (2005) montris, spertuloj de esperanto emas havi pli da konscio pri la akceptebleco de diverseco en frazstrukturoj ol komencantoj kaj progresintoj. Kvankam tio certe povas esti ebleco, ne estas tre verŝajne, ĉar la specimenaro entenis, ekzemple, kelkajn bone konatajn angle parolantajn verkintojn kies alta lingva nivelo estis montrita per la fakto ke ili jam multe verkis antaŭe uzante esperanton.

Ĉiel ajn, malgraŭ ĉiuj supre menciitaj intermiksaj faktoroj, la fakto ke tiu studo ankoraŭ povis trovi statistike signifikan influon de lingva fono estas rimarkinda. Tiu povas indiki ke la influo de lingva fono ŝajnas esti trovebla eĉ post daŭra renkonto de diversaj aliaj lingvoj kaj interinfluoj. Estis montrite en aliaj studoj ke, eĉ post longa tempo, la gepatra lingvo povas influi la uzadon de L2<sup>+</sup>-natura lingvo. Camacho (1999:130), ekzemple, raportis ke infanoj kies gepatra lingvo estas la keĉua montris ne-hispanan uzadon de frazstrukturoj, eĉ post tri jaroj da tuta mergiĝo en hispane parolanta medio. En esperanto ne estus surprizo trovi ke tia influo ĉeestas eĉ pli longe, ĉar ne ekzistas fortaj konformaj premoj kiel en naturaj kaj naciaj lingvoj kie L2<sup>+</sup>-uzantoj emas alproksimiĝi al la L1-lingva celnivelo. Ni devas ankaŭ noti ke esperanto permesas grandan diversecon en stiloj, kaj ekzistas ebleco ke parolantoj de esperanto uzas tiun flekseblecon por disvolvi sian propran individuan stilon aŭ eĉ por konservi iom de sia nacia identeco.

### 3.3. Konkludoj kaj rekomendoj por estontaj esploroj

La influoj de gepatra lingvo sur parol- kaj prononc-manieron estas tute normala okazo ankaŭ trovita dum parolado de esperanto (Sherwood 1982:188). Pli kaj pli da atento nun estas direktita al esploroj de multlingvaj interinfluoj en la uzado de gramatiko. Kvankam esperanto estas lingvo kun ĉefe SVO-

aj frazstrukturoj, varioj el tiu vortordo estas same akcepteblaj (Kalocsay & Waringhien 1980, §272, p.362). Ĉar esperanto permesas tian flekseblecon de stilo, ĝi estas taŭga ilo por studi la influon de lingva fono sur la uzadon de L2<sup>+</sup>-esperanto. Nagata & Corsetti (2005) esploris la ĉeeston de ĉi tiu fenomeno dum juĝado de akceptebleco de diversaj frazoj, kaj ankaŭ dum priskribo de sceno en montrita bildo. La nuna studo etendis ĉi tiun esploron kaj analizis la diversecon de frazstrukturoj en publikigitaj esperantaj tekstoj. La rezultoj ĝenerale konfirmis la trovon de Nagata & Corsetti (2005) ke la lingva fono influas kiom da diversaj frazstrukturoj estas uzataj en L2<sup>+</sup>-esperanto. Por minimumigi eventualajn intermiksojn variablojn ĉi tiu studo nur rigardis specimenojn el unu fonto, la revuo *Kontakto*, kaj ekskludis intervjuojn, poemojn, tradukitajn tekstojn kaj artikolojn kiuj estis markitaj de la redaktoro kiel facilaj. Por estonta esploro indus sciigi ĉu la trovitaj rezultoj estas similaj en aliaj tipoj de skribaĵo, kiel romanoj aŭ teknikaj tekstoj.

Kvankam la specimeno en la nuna studo ne estis sufiĉe granda por fari pli ampleksajn analizojn, ĝi estis sufiĉe granda por memfide supozi ke iuj eksteraj variabloj estis simile distribuitaj inter la tri lingvogrupoj slava, ĝermanida kaj latinida. Sed kiel menciite supre, ekzistas kelkaj metodaj limigoj en la nuna studo, kaj estontaj esploroj estas bezonataj por neigi iujn restajn alternativajn interpretojn de la nunaj trovoj. Se tiuj rezultoj estos konfirmitaj, ankaŭ estos interese pliesplori precize kial esperantoparolantoj el slava lingvofono emas uzi pli da diversaj frazstrukturoj ol homoj el ĝermanida kaj latinida lingvofonoj. Ne nur pli da detaloj pri lingva sperto en esperanto aŭ scipovo de aliaj lingvoj estus utila en tiaj estontaj esploroj, sed ankaŭ pli da detaloj pri iaj diferencoj en maniero de uzado de ne-SVO-aj frazoj. Ĉu frazstrukturaj varioj en la uzado de esperanto montras influon de gepatra lingvo aŭ ĉu ĝi simple povas esti speguligo de emo de slavaj esperantistoj je pli da lingva kaj stila eksperimentado? Tiaj pluaj esploroj verŝajne estus plej bone farotaj per prikvalitaj studmetodoj.<sup>11</sup>

Fine, notindas, kvankam estis diferencoj inter la uzado de frazstrukturoj de aŭtoroj el diversaj lingvofonoj, ke tiuj diferencoj estis relative malgrandaj. En specimenoj de 30 frazoj, slavaj esperantoparolantoj uzis mezvalore 3,5 ne-SVO-ajn frazojn, kompare al latinidaj esperantoparolantoj, kiuj mezvalore uzis 2,1 da tiaj frazoj. Tiu montras ke varioj de vortordaj stiloj estas relative limigitaj kaj ne ŝajnas negative influi la kompreneblecon de esperanto. Ĝi tute ne signifas ke esperanto estas disiĝanta aŭ sindividanta en dialektojn.

---

<sup>11</sup>Angle: *qualitative research methods*.

## Referencoj

- Camacho, José (1999). From SOV to SVO: the grammar of interlanguage word order. *Second Language Research* **15**(2), 115–132.
- Cook, Vivian J. (1991). The poverty-of-the-stimulus argument and multi-competence. *Second Language Research* **7**(2), 103–117.
- Cook, Vivian (1999). Going beyond the native speaker in language teaching. *TESOL Quarterly* **33**(2), 185–209.
- Cook, Vivian J. (2004). *The English writing system*. London: Edward Arnold.
- Cook, Vivian J.; Iarossi, Elisabeth; Stellakis, Nektarios; Tokumaru, Yuki (2003). Effects of the second language on the syntactic processing of the first language. En: V. J. Cook (red.), *Effects of the second language on the first*, p. 214–233. Clevedon: Multilingual Matters.
- Davies, Alan (2003). *The native speaker: myth and reality*. Clevedon: Multilingual Matters.
- Fiedler, Sabine (1999). *Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto*. Frankfurt am Main: Lang.
- Fidler, Sabine (2006). Standardization and self-regulation in an international speech community: the case of Esperanto. *International Journal of the Sociology of Language* **177**, 67–90.
- Gledhill, Christopher (2000). *The Grammar of Esperanto. A Copus-Based Description*. Munkeno: Lincom Europa. Dua eldono. 151 pp.
- Herring, Joshua (2005). *Syntactic and lexical changes in Esperanto: a quantitative and corpus-based survey. Parolo prezentita ĉe kolokvo The Second Midwest Computational Linguistics Colloquium*. Elektronika dokumento haveblas ĉe [cilt.osu.edu/mclc/paper/syntactic\\_herring.pdf](http://cilt.osu.edu/mclc/paper/syntactic_herring.pdf) [tiel!]
- Hopp, Holger (2005). Constraining second language word order optionality: scrambling in advanced English-German and Japanese-German interlanguage. *Second Language Research* **21**(1), 34–71.
- Jansen, Willem Hendrik (2007). *Woordvolgorde in het Esperanto*. Doktora disertaĵo prezentita 2007-10-02 al Universiteit van Amsterdam. Utrecht: Lot. vi + 283 pp. (Kun Zusammenfassung in Deutsch, Summary in English kaj Resumo en Esperanto.) ISBN 978-90-78328-36-0.
- Kalocsay, K[álmán, Kolomano]; Waringien, G[aston] (1980). *Plena Analiza Grammatiko de Esperanto*. 4-a eldono. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Lindstedt, Jouko (2006). Native Esperanto as a test case for natural language. En: Mickael Suominen & al. (red.), *A man of measure: Festschrift in honour of Fred Karlsson on his 60th birthday*, p. 47–55. Turku: The Linguistic Association of Finland. (Special Supplement to *SKY Journal of Linguistics*, Vol. 19.) Elektronika versio estas havebla ĉe [www.ling.helsinki.fi/sky/julkaisut/SKY2006\\_1/1FK60.1.5.LINDSTEDT.pdf](http://www.ling.helsinki.fi/sky/julkaisut/SKY2006_1/1FK60.1.5.LINDSTEDT.pdf)

- Liu Haitao (2000). Gramatiko naskiĝas el tekstaro. Recenzo de Gledhill (2000). *Esperantologio / Esperanto Studies* **2**, 39–47.
- Nagata, Hiroshi; Corsetti, Renato (2005). Influoj de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto: psikolingvistika esploro. *Esperantologio / Esperanto Studies* **3**, 5–39.
- La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* 2002. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Selinker, Larry (1972). Interlanguage. *International Review of Applied Linguistics in Language Teaching* **10**(3), 209–231.
- Sherwood, Bruce Arne (1982). Variation in Esperanto. *Studies in the Linguistic Sciences* **12**(1), 183–196. Elektronika dokumento estas havebla ĉe [www4.ncsu.edu/~basherwo/docs/Variation\\_in\\_Esperanto.pdf](http://www4.ncsu.edu/~basherwo/docs/Variation_in_Esperanto.pdf)
- SPSS, Inc. (2005). *SPSS for Windows*, Version 14.0. Chicago: SPSS, Inc.
- Tsimpli, Ianthi; Sorace, Antonella; Heycock, Caroline; Filiaci, Francesca (2004). First language attrition and syntactic subjects: a study of Greek and Italian near native speakers of English. *International Journal of Bilingualism* **8**(3), 257–277.

*Pri la aŭtoro*

Chris Krägeloh estas docento pri psikologio ĉe Auckland University of Technology kaj kundirektoro de la Nov-Zelanda WHO (*World Health Organization*) Kunlabora Centro por Esploro pri Vivkvalito. Origininte en Germanio li transloĝiĝis al Nov-Zelando antaŭ pli ol 10 jaroj. Liaj esplorinteresoj estas eksperimenta psikologio kaj apliko de la WHO-demandilo pri vivkvalito. Antaŭ nelonge Chris komencis verki pri esperantologio kaj interlingvistiko, kaj fariĝis kunredaktoro de la aŭstralia kaj nov-zelanda bulteno *Esperanto Sub la Suda Kruco*.

*Adreso de la aŭtoro*

Christian Krägeloh <[chris.krageloh@aut.ac.nz](mailto:chris.krageloh@aut.ac.nz)>, Department of Psychology,  
School of Public Health and Psychosocial Studies,  
Faculty of Health & Environmental Sciences,  
Auckland University of Technology – North Shore Campus  
Private Bag 92006, Auckland NZ-1142, New Zealand.  
Telefono +64 9 921 9999, aparato 7103. Faksilo +64 9 921 9780.